

ESPERANTA FINNLANDO

4-1953

DECEMBRO

Organo de ESPERANTO=INSTITUTO DE FINNLANDO .
ADMINISTRACIO KAJ ABONEJO: Eldono Vilho Setälä,
filio: Töölöntullinkatu 7 A 1, girokonto 6117.
Abonprezo en Finnlando 200 mk, subtena abone
1000 mk, al eksterlande 260 mk aŭ la respond-
kuponoj aŭ 8 l.-, pagota al iu esperanta libr-
ejo. Redakcia komitato: Hannes Koivu kaj Kaarlo
Jokinen, ĉefredaktoro Vilho Setälä, adreso: Ma-
tinkylä, Iirislahti, Telefono 88-2170. Tilaushin-
ta Suomessa 200 mk.



ESPERANTO KANSAKUNTIEN YHTEISJÄRJESTÖJEN TUTKITTAVANA ESPERANTOJÄRJESTÖT (jatkoa)

"Universala Ligo" on suuri liitto, jonka päämääränä on levittää maailman valtioliiton ja maailmanhallituksen aatetta. Käyttämällä esperantoa virallisena kielenä. Suuri kansainvälinen työläisesperantistien järjestö on "Sennacieca Asocio Tutmonda", jonka kotipaikka on Pariisi.

ERILAISIA ESPERANTON KÄYTTÄMÄLLÄ SOVELLUTUKSIA

Esperanton soveltaminen käytäntöön on niin moninaista ja laajaa, että tässä on mahdollista kosketella vain muutamia tärkeimpiä saavutuksia tällä suunnalla.

"Konsuli"verkko. Esperantoaitavien, U.E.A.:han liittyneitten yksilöjäsentien keskuudesta on valittu konsuleita, "delegitoja", jotka ovat lupautuneet palvelemaan maksutta jäsenistöä Liiton sääntöjen mukaan. Erikoisedustajiksi on valittu eri alojen asiantuntijoita, lainopin, lääketieteen, talouselämän jne aloilta, suorittamaan erikoisia palveluja. Kaikkien näiden palvelevien konsulien nimet julkaistaan vuosittain U.E.A.:n vuosikirjassa maiden ja kaupunkien mukaan aakkosjärjestyksessä; lisäksi on aineenmukainen hakemisto erikoisedustajista. Näitten palvelujen ainoa kieli on luonnollisesti esperanto. V. 1951 U.E.A:lla oli yhteensä 2018 "konsulia" 61 maassa. He suorittivat vuotta kohti 12-15000 kirjattua palvelua hankkien tietoja esim. kaupan ja liiketoiminnan, matkailun, palkka- ja virka-asioiden,

oetuksen ym. aloilta, vieläpä hankkivat tietoja tieteellisten kysymysten selvittelyä varten.

Avustustyö. Ensimmäisen maailmansodan aikana U.E.A. järjesti erikoisen palvelutoimiston avustukseen sodan vuoksi vstävistään ja omaisistaan eristyneitä. Palveluun sisältyi kirjeenvaihdon välittäminen, kadonneiden etsiminen, lasten palauttaminen koteihinsa, pakettien lähetykset ym. yhden ainoan vuoden kuluessa suoritettiin toista sataa tuhatta palvelua maksutta, ihmisvähengen innoittamien U.E.A:n "konsulien" avulla. Toisen maailmansodan aikana U.E.A. suoritti samantapaista palvelua, mutta olosuhteiden takosta pienemässä mittakaavassa.

Kauppa. Monet tärkeät liikelaitokset, kuten Cookin matkatoimisto, lentoyhtiöt KLM ja SAS, Lontoon osuusliike, Leipzigin, Budapestin, Lvonin ym. messut ja useat teollisuusyritykset käyttävät esperantoa.

Matkailu. Sotien välivuosina yli 400 kaupunkia julkaisi esperantokielisiä opoita ja mainoslehtiä. Tähän mennessä on yli 600 kaupunkia täten käyttäneet kansainvälistä kieltä. Eri esperantojärjestöjen puitteissa toimii useita matkatoimistoja, jotka järjestävät kiertomatkoja ja tarjoavat hauskaa lomaviihtoa samalla edistämällä kansainvälistä vuoroaikutusta ja vstävyyttä.

Radio. Ensimmäinen esperantokielinen radio-ohjelma lähetettiin Newarkista (asema WYZ) ja Lontoosta. Sitä seurasivat lähetykset Moskovasta, Rio de Janeirosta, Prahasta, Genevestä, Helsingistä, Parisista ja monesta muusta paikasta. Tätä nykyä 15 yleisradioasemaa lähettää säännöllisesti esperantokielistä ohjelmaa. V. 1951 nämä, 10 eri maassa sijaitsevat asemat lähettivät yhteensä 1053 eri ohjelmaa.

Posti, lennätin ja puhelin. Monet maat ovat julkaisseet virallisia postikortteja ja postimerkkejä, joissa on esperantokielineen tai esperantoa koskeva teksti, ensin Neuvostoliitto v. 1925-27, sitten Lichtenstein 1930 ja myöhemmin vuosina Brasilia ja Itävalta. Kansainvälinen Lennätinliitto tunnustaa esperanton "selväksi" kieleksi. Nykyään toimii voimakas PTT-virkailijoiden liitto, jonka jäsenet puhuvat esperantoa.

Kongressit ja konferenssit. Kansainvälinen esperantokongressi pidetään vuosittain. Siihen ottavat osaa edustajiensa kautta kaikki U.E.A:han liittyneet kansalliset esperantoliitot sekä joukko yksityisiä esperantisteja. Lähimpiin kongresseihin osallistuneiden luku on ollut keskimäärin 2000. Joukko muita kongresseja ja erikoiskonferensseja pidetään. V. 1951 osallistui tällaisiin kokouksiin yhteensä noin 10000 henkeä. Kaikkien niiden ainoana keskustelukielenä on esperanto.

Kansainvälinen kesäyliopisto. Tämä laitos perustettiin nykyisessä muodossaan v. 1948. Sen tarkoituksena on esittää kansantajuista tietoa kaikkien tieteiden alalta esperantoksi. Kansainvälinen kesäyliopisto on toistaiseksi toiminut yleisten esperantokongressien aikana, viikon kerrallaan. Niin pian kuin taloudellinen asema sallii se tulee toimimaan itsenäisenä laitoksena jossakin huomattavassa yliopistokaupungissa kesäloman aikana.

Kansainvälisen kesäyliopiston luennoitsijoina on yliopiston professoreja ja asemaltaan heihin verrattavia henkilöitä.

Viisi kesäyliopistokurssia on pidetty tähän mennessä: Malmö (Ruotsi) 1948, Bournemouth (Iso Britannia) 1949, Pariisi (Ranska) 1950, München (Saksa) 1951 ja Oslo (Norja) 1952. Seuraava yliopistokurssi pidetään Zagrebissa (Jugoslavia) 1953. Luennoitsijoiden luku syksyyn 1952 mennessä oli 25.

Henkiset kilpailut. Kongressien yhteydessä on viime vuosina pantu toimeen henkiset kilpailut, aineina mm. runous ja proosa, alkuperäinen ja käännetty, puhetaito ym. Osanottajien määrä on ollut ilahduttavan suuri ja suoritusten taso korkea. Osllossa v. 1952 jätti 46 kilpailijaa 18 eri maasta 112 kilpakirjoitusta arvosteltaviksi.

LOPPUSANAT

On erikoisesti korostettava, että koko se valtava työ, mitä kansainvälisen kielen kehittäminen, levittäminen ja käytäntöön saattaminen mahdollisimman laajalti kaikilla kansainvälisen elämän aloilla on vaatinut ja yhä vaatii, on tuhansien yksityisten asianharrastajien panosta, ilman minkään virallisen laitoksen tukea. Tulok-

set on saavutettu miltei ilman taloudellisia varoja ja arvaamattomista vastuksista huolimatta. Tähän asti ovat tähän sivistykselliseen ja ihmisystävälliseen työhön kiinnittäneet huomiota enemmän kansainvälisen yhteistyön vastustajat kuin sen kannattajat. Niinpä Hitlerin hallitus tuomitsi ja kielsi esperanton ja esperantojärjestöt kuuluisalla Martin Bormannin asetuksella kesäkuussa 1936. Myös Saksan valtaamissa maissa esperanto oli sodan aikana kielletty. Diktatoriset hallitukset yleensäkin ovat vainonneet esperantoa.

On kieltämätön totuus, että kieli, joka on voittanut kaikki vastukset alkaen "hiljaisuudella tappamisesta" selvään pannaanjulistukseen asti, joka näissä olosuhteissa on onnistunut kehittymään, kasvamaan, laajalti leviämään, ei ole ainoastaan syvästi juurtunut elämään ja yhteiskuntaan vaan myös osoittanut omaavansa loistavan tulevaisuuden. Tärkeän kansainvälisen kulttuurilaitoksen moraalinen tuki tietenkin jouduttaisi voimakkaasti esperanton leviämistä ja edistäisi sen käyttöä. Tällä olisi valtava vaikutus koko maailman kulttuurin ja moraalisen yhtenäisyyden yleiseen kehittymiseen.

& & &

JÄLKISANAT

Esperanto Unescon yleiskokouksessa 1952.

Siinä Unescon yleisistunnossa - Parisissa marras-joulukuussa 1952 - jossa otettiin käsiteltäväksi edellä mainittu esperanton kannattajien vetoisuus, osana yleisestä kysymyksestä kielivaikkeuksien ja niiden voittamisen tutkimisesta Unescon puitteissa, jätettiin muut ratkaisuehdotukset (kahden tai kuuden kansalliskielen vahvistaminen Yhtyneitten kansakuntien hyväksymäksi kansainväliseksi kieleksi) huomioon ottamatta, mutta esperanton ei mutta esperanton edistämistä koskeva vetoisuus lykättiin työvaliokuntaan valmisteltavaksi. Tähän kuuluivat 20 valtion edustajat, mm. Sveitsin, Ruotsin, Norjan, Iso-Britannian, Ranskan, Yhdysvaltain, Intian, Syyrian, Libanonin ja Saksan. Sveitsin edustajisto teki ehdotuksen päätöslauselmaksi, jonka perusteluissa mainittiin esperanton kannattajien Yhtyneille kansakunnille osoitama vetoisuus ja esperanton avulla saavutetut huomattavat tulokset henkisen vuorovaikutuksen ja yhteisymmärryksen kehittämiseksi eri kansojen kesken, ja joka päättyi sihteeristölle osoitettuun kehoitukseen ryhtyä, osana säännöllisiä tehtäviään, tarpeellisiin valmistaviin toimenpiteisiin, jotta Unescon yleiskokous voisi kahdeksannessa istunnossaan (Montevideossa 1954) päättää

Vojaĝo en Esperantujo

En aprilo-majo mi faris kun mia edzino 6-semajnan vojaĝon en Meza kaj Suda Eŭropo per la helpo de Esperanto kaj esperantistoj.

Ĉar la ekvojaĝo prokrastiĝis tri tagojn pro malsano, ni flugis el Helsinki ĝis Amsterdam, por atingi la faritan horaron de la vojaĝo. Malgraŭ tio, ke ni ne informis al tiu urbo pri nia alveno, ni hazarde renkontis tie du esperantistojn. La ŝoforo, kiu veturigis nin al stacio, parolis Esperanton, kaj la unua fervojisto, kiun ni renkontis en stacidomo, estis sperta esperantisto.

Promenintaj en la urbo ĉirkaŭ du horojn, ni vojaĝis trajne tra belaj florkampoj al Rotterdam, kie nin atendis niaj bonaj ĝeamikoj, gesinjoroj Langerak. En la jaro 1948 ili estis niaj gastoj en Finnlando, kaj 1950 ni vizitis ilin la unuan fojon. En ilia gastama hejmo ni loĝis kvin tagojn farante ekskursojn kaj vizitante la hejmojn de aliaj esperantistoj.

Unu vesperon ni ĉeestis la kunvenon de laborista Esperanto-societo, kaj mi havis okazon paroli pri nia lando kaj pri la vivo de nia popolo. Alian tagon ni ekskursis al Eindhoven, kie samideano v.d. Aa nin gastigis kaj gvidis en la tre vidinda fabriko de Philips.

Post kvintaga restado en gastama Nederlando ni vojaĝis al Belgio, kie ni unue haltis du tagojn en Antwerpen. F:ino H. de Ketelaese kaj instruistino M. Hofkens afable gvidadis nin klarigante la vidindaĵojn.

La sekvinta etapo estis Marchienne au Pont en Suda Belgio. Tie samideano R. Paulus nin akceptis kaj gastigis kvar tagojn. Ni pasigis agrablajn vesperojn kune kun kelkaj lokaj esperantistoj, kiujn gesinjoroj Paulus invitis por saluti nin. Al la najbara urbo Charleroj ni faris kelkajn vizitojn, kaj en unu tago ni vojaĝis al Bruselo, kie ni ĉeestis la kunvenon de Esperanto-societo. Ankaŭ tie oni donis al mi okazon fari paroladon, kiun sekvis vigla diskuto. Ni rimarkis, ke la belgaj gesamideanoj multe interesiĝis pri nialandaj cirkonstancoj.

Post Belgio nia vojaĝo direktiĝis al Francio, kie ni unue haltis en Parizo kvin tagojn. Ni loĝis en hotelo apud la universitato Sorbonne, sed samideano Bachelier venis ĉiutage je la 14:a horo, por ofereme gvidadi nin al la riĉaj vidindaĵoj de Parizo kaj Versailles. La antaŭtagmezojn ni memstare promenadis kaj vizitis muzeojn kaj aliajn ne malproksimajn vidindaĵojn.

Ankaŭ en Parizo ni havis okazon ĉeesti la kunvenon de Esperanto-societo. La prezidanto, s:ro Belhoste afable dediĉis la programon de la tuta kunveno por ni. Post mia prelego, kiu daŭris unu horon, sekvis vigla diskuto. Grandan interesiĝon kaj ankaŭ dubojn kaŭzis mia rakonto pri la finna banejo kaj pri la varmega temperaturo, kiun homoj povas tie toleri.

La vidindaĵoj en tiu metropolo estas tiel abundaj kaj la vivo sur ĝiaj stratoj tiel vigla kaj varia, ke ne estas eble en la kadroj de tiu ĉi artikolo rakonti pri ili.

El Parizo ni daŭrigis la vojaĝon orienten kaj haltis en vilaĝo Avrolles, kie la esperantista familio Delagneau, patro, patrino kaj 8-jara filino, nin akceptis kaj gastigis. Ni havis okazon vidi vilaĝan popollernejon, kies instruistoj s:ro kaj s:ino Delagneau estis, kaj koniĝi al franca bieno. Piede ni ekskursis al urbeto St. Florentin kaj aŭtobuse al Auxerre, malnova urbeto kun riĉa historio.

Ankoraŭ foje ni haltis en Francio, nome en Chalon-sur-Saône. Tie ni estis gastoj de instruisto Laforest, kiu estis estinta kun sia edzino nia gasto dum la Olimpiado en Helsinki. Ni manĝis francajn manĝaĵojn kaj vidis, same kiel en Avrolles, la hejmon kaj vivon de franca familio.

La 1:an de majo ni vojaĝis al Italio, kie la unua halto okazis en Torino. Sep esperantistoj nin atendis en la stacio. Ni loĝis en luita priv. ĉambro, ĉar pro la granda aŭtomobil-eksponcio hotelaj ĉambroj ne estis riceveblaj. En kafeja teraso (sur trotuaro) ni sidis kaj babilis kun gesamideanoj, kaj ni konstatis, ke la italaj gesamideanoj prononcas Esperanton modele. El la amika grupo de esperantistoj ni antaŭ ĉio memoras s:anon Fighiere, kiu multe kaj ofereme nin helpadis.

niistä toimenpiteistä, joihin mainitun vetoomuksen johdosta on ryhdyttävä. Työvaliokunta omaksui tämän ehdotuksen yksimielisesti, ja yleiskokous päätti antaa siihen sisältyvän kehoituksen sihteerialle, lisäten siihen, Britannian ehdotuksen nojalla, kehoituksen vaatia jäsenvaltioilta tietoja esperanton tähänastisesta leviämisestä ja opetuksesta näissä maissa. Hyväksytyyn päätöksen sanamuoto on seuraava:

Toiminnanjohtaja oikeutetaan tiedoittamaan Jäsenvaltioille esperantoa suosittleva kansainvälinen vetoamus, joka on esitetty Yhtyneille Kansakunnille, joka puolestaan on sen lähettänyt Unescolle, sekä ryhtymään, saatujen selvitysten perusteella, tarpeellisiin toimenpiteisiin, jotta Yleiskokous saattaisi kahdeksannessa istunnossaan päättää niistä toimenpiteistä, joihin on ryhdyttävä mainitun vetoomuksen johdosta.

20 ESPERANTA FINNLANDO

En Torino ni renkontis ankaŭ la prezidanton de Itala Esperanto-Federacio, rektoron de la universitato en Parma, profesoron Canuto. Li promesis aranĝi en sia urbo dum nia revena vojaĝo el Suda Italio okazon fari publikan prelegon, kaj ni interkonsentis, ke mi prelegos pri nia epopeo Kalevala.

La dua halto en Italio okazis en Bologna. Tie ni loĝis en hotelo, sed samideano Zacconi kaj kelkaj aliaj esperantistoj nin fidele gvidadis kaj gastigis. En Roma s:anoj Minnaia, la patro kaj la filo, akceptis nin en stacio kaj gvidis en la hotelon. Dum kvin tagoj ni koniĝis al la sennombraj vidindaĵoj de la "eterna urbo" ricevante gvidon kaj valoran helpon ĉefe de s:ino Minnaia. Ni renkontiĝis ankaŭ kun kelkaj aliaj esperantistoj, i.a. kun nederlanda s:ano Lubbe kaj s:ro Filippi. La lastenomita kondukis nin al pastro Miklòs, hungara samideano, kun kiu ni pasigis agrablan duonhoron en flanka ĉambro de iu preĝejo.

En Napoli nin gvidadis s:ro Tancredi. Ni restis tie nur unu tagnokton kaj revenis al Roma, kaj la sekvintan matenon ni tramveturis al stacio kaj envagoniĝis, por vojaĝi al Parma. Je la 15:a horo ni estis tie, kaj en la stacidomo nin atendis profesoro Canuto kaj s:ino Rosetti, kiuj gvidis nin unue en la hotelon kaj poste montris la vidindaĵojn de la urbo. Profesoro Canuto montris ankaŭ sian universitaton en la urbo kaj la jur-medicinan fakon eksterurbe en malsanulejo Maggiore. Vespere okazis komuna tagmanĝo kun deko da esperantistoj en restoracio kaj post ĝi mia prelego en la prelegejo de la universitato. Profesoro Canuto tradukis ĝin en italan lingvon, ĉar per gazetara anonco estis invititaj ankaŭ neesperantistoj. Ĉiujn niajn elspezojn en Parma pagis la loka Esperanto-societo.

Okazis ankoraŭ unu halto en Italio, nome en Milano, kie ni restis unu tagnokton. Kolektiĝis deko da esperantistoj, kaj vigle babilante ni kune pasigis dimanĉan posttagmezon. Tiel finiĝis la 10-taga vojaĝo en Italio.

La 11/5 ni transveturis la limon al Svisio. Tie ni unue haltis kelkajn horojn en Thun, kie s:ano Swarz montris al ni la vidindaĵojn de tiu bela, historia urbo.

En Bern ni loĝis du tagnoktojn en hotelo Metropol, posedata de esperantista familio Fischer. La loka Esperanto-societo kunvenis en la restoracio de la hotelo, kaj dum la babilado unu samideano tre lerte montris mirindajn magiaĵojn per ludkartoj kaj aliaj objektoj.

En Zürich nin atendis malnova konatulo, trajnestro Sonderegger, kiu antaŭ du jaroj vizitis Finnlandon kaj nian hejmon. Ĉe li ni pasigis agrable posttagmezon kune kun liaj familianoj kaj kelkaj esperantistoj.

La 15/5 ni denove transiris landlimon kaj haltis en urbeto Crailsheim en Germanio. Tie gesamideanoj Gscheidel gastigis nin dum tri tagoj kaj veturigis per sia aŭtomobilo al kvin aliaj urboj, i.a. al la belaj miljaraj urboj Rothenburg kaj Dinkelsbühl.

Okazis ankoraŭ unu halto en Germanio. En Hannover ni estis gastoj en la hejmo de inĝ. Michling kaj lia edzino, al kiuj ni konatiĝis jam antaŭ kelkaj jaroj. Ankaŭ tie mi parolis en la kunveno de esperantistoj, kaj post la parolado sekvis diskuto, dum kiu oni faris al ni multajn demandojn pri nialandaj cirkonstancoj.

En Danlando ni haltis nur kelkajn horojn ĉe parencoj en urbeto Sorø, kaj en Kopenhago ni la 20/5 eniris la finnan ŝipon Ariadne. Tiam ni estis kvazaŭ hejme, ĉar tie oni komprenis kaj parolis la finnan lingvon.

Dum la vojaĝo ni vidis sennombrajn interesajn vidindaĵojn kaj spertis multajn travivaĵojn, sed en la kadro de tiu ĉi artikolo ne estas eble eĉ aludi al ili, ĉar la spaco en tiu ĉi revueto estas limigita. Montriĝis denove, ke Esperanto estas dum vojaĝo pli utila ol iu ajn alia lingvo.

H:s K.

SOTAVANGIT TULKKIEN ARMOILLA

Helsingin Sanomat kertoivat viime keväänä, Korean sotavankien kohtalosta neuvoteltaessa, nähtien neuvottelujen voittamattomista kieli-vaikkeuksista. Niinpä eräässä vaiheessa oli jo sovittu pääperiaatteista, mutta aamuvarhaisella pidetyssä istunnossa tehtiin pieni korjaus päätöslauselman tekstiin. Istunto ei kestänyt puoltakaan tuntia, mutta kielenkääntäjien armeija sai työskennellä yhtä päätä seuraavaan aamuun asti, ennenkuin muutos oli tulkittu ja lopullisessa asussaan kaikilla vaadituilla kielillä.

ESPERANTA FINNLANDO

Pro la tro malgranda pozitiva intereso montrita de la Finnlanda esperantistaro, nia gazeto provizore ne aperos en 1954. Dankante al niaj malmultaj amikoj

La redakcia komitato kaj ĉefredaktoro.

